



# PENSEO

*N-ro 370*

*aŭg. / 2022*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elfino.cn/penseo/penlisto.htm>

## Moissey Bronshteyn (Rusio)



### Mi estas kiel vi

Mi estas kiel vi,  
mi estas via ero,  
la karn' de via karn',  
la sang' de via sang'.  
Bongustas ĉiu vort'  
el via vort-utero,  
frandindas ĉiu son'  
por mia viva lang'.

Mi estas kiel vi,  
ni sonĝe vidas samon,  
ni samas en impet'  
kaj en anima flam'.  
Akceptas mi de vi  
kaj amon kaj malamon,  
sed revas certe, ke  
ĉeestu pli da am'.

Mi estas kiel vi,  
min lezas viaj mankoj,  
ne bonas via mis'  
por mia sangoprem',  
sed mi defendas vin  
per la fidinda man', kaj  
samkiel en real'  
defendus mi min mem.

Mi foje dum diskut'  
ne tuj kapablas nei  
akuzojn de l' rival'  
en duba malkomfort',

sed post momenta dub'  
jam pretas malkabei,  
per trafa argument',  
per via prava vort'.

Se en molesta hor'  
ripetos historio  
la nigrajn paĝojn de l'  
kruela persekut', -  
mi estas kiel vi,  
do certe, malgraŭ ĉio,  
nur senatenda paf'  
kondamnos min al mut'.

Mi estas kiel vi,  
mi mem elektis tion.  
Ho vi, Esperantuj' –  
feliĉa vivdestin'.  
Pro trafa koincid'  
mi devas danki Dion:  
vi estas kiel mi,  
kaj mi adoras vin.

11.06.05

## Gao Jun (Ĉinio)

### Skribi ion por somero

mi ne scias  
ĉu somero havas rakontojn  
ne pluvis en la tago de somera solstico  
la vento estis diafana  
la enirejo de la vojo estis diafana  
flugiloj ankaŭ diafanis  
sed  
li plenplenis je forto  
li solviĝis en la teron

li banas la fieran sunon

cikado penforte demetis sian surtuton  
mi serchas rememoron laŭ ĝia ĉirpo  
ĝi sin kaŝas kaj atendas pluvon  
por forlavi polvon  
pluvo tiel travideblas  
ke oni sentas urban trivialecon  
la somero restas en la domo  
kaj rakontas siajn historietojn

mi iru al la montvilaĝo kiel kampulo  
kaj aŭskultu al la vento  
rakonti la somerajn historietojn  
mi boligu kruĉon da teo  
per akvo de roĵo inter montoj  
dissemu la kampojn  
kaj forigu realan lingvaĵon el poemoj  
fab-bretoj, libeloj kaj cikadoj  
ne informiĝu pri kieon de poemoj

la vento honestas kiel sendito  
kaj penas la distancon  
ne estas la forma vento  
kiu kreas la belecon  
ĝi batas foliojn  
kaj rikoltas poemojn  
mi petas de la vento  
ke mia animo forlasu mian korpon  
por bruligi la lampoon en la foro  
ĝi estas la maro de sonĝoj  
kantoj en infaneco venas de tie



## Rita Mkrtchyan (Armenio)



Tro longa estis nigra nokto,  
La pensoj batis, kiel pluv', sen fin',  
Kaj nigra kato sur konstanta loko

Ne dormas, mi karesas ĝin.  
Ne dormas la fenestroj, altaj domoj,  
Observas ĉion luno kaj ĉiel',  
Kaj malaperis, ŝajnas, tuta mondo,  
Okuloj de la kato brilis kiel stel'.  
Maŝinoj bruas, iu kantas forte,  
La hundoj hurlas kiel la siren',  
Atendas ĉiuj dum sendorma nokto  
La kato, mi, - alvenon de maten'!

\*\*

En mond' ŝanĝema, batalanta  
Militoj, plagoj kaj minacoj,  
Jes, mi elektas Esperanton,  
Se Esperanto servas pacon.  
Nekoncentebla tempo nia,  
Malbono regas eble ĉiam,  
Se ni parolos Esperante  
Ĉu pli komprenos unu la alian?  
Ideo ŝajnas tre naiva,  
Sed provu resti optimistoj,  
Voĉdonu por la amikeco,  
Se estas ni Esperantistoj!

## Ángel Arquillos (Hispanio)



*Doloras al mi*

Doloras al mi la tristo  
De la homoj suferantaj  
Doloras al mi la vivo  
Kaj la soleco konstanta  
Doloras al mi la timo  
De multaj homoj kaŝantaj  
Kaj la penso pri la fino.

majo 2022

## Yohanes Manhitu (Indonezio)



*Pluvo kaj espero neniam velkas*

Hodiaŭ sunlumas kvankam ne varmiĝas.  
La suno venis, sed ŝajne ne plenbrilas;  
Ĝi donas sunlumon, sed ne tutkore,

dum tiu ĉi jaro, jaro malseka.  
 Ĉiu jaro havas sian propran formon  
 kaj la ĉi-jara formo estas malsama.  
 Se ne dum la nokto, certe dum la tago,  
 ni vidos pluvon kaj sentas malvarmon.  
 La grundo malsekiĝas, neniam sekiĝas;  
 la folioj estas verdaj, neniam flaviĝas.  
 Ne estas tempo por kultivi kampon,  
 maizo kaj rizo ne plenigos grenejon.  
 La pluvo ne ĉesas, ni ne eliras;  
 manĝi kaj trinki, ni daŭrigas.  
 Esperu, ke manĝaĵo ne malpleniĝos  
 por ke ni ĉiuj pasigu monaton.  
 Ĉiu jaro havas sian propran naturon,  
 homoj ne havas elekton,  
 sed posedas cerbon por serĉi vojon  
 por ĉiam ĝoji dum ili havas vivon.  
 Konfidu ni al espero neniam velka  
 kaj tenu firme la eternan promeson,  
 plifortigu fidon kaj akriĝu intelekton,  
 ni povos savi nin en tempo malfacila.

*Noemuti, Okcidenta Timoro, marte 2011*

## Okuloj allogitaj

Multfoje mi vere ne havas povon  
 malhelpi tiun ĉi paron de okuloj ŝatantaj,  
 vidantaj la blankon kaj la nigron de la  
 mondo.  
 Ili estas lampo iluminanta por tiu ĉi koro.  
 Kie mi trovos grandan potencon  
 por direkti la okulojn al bonaj vidaĵoj  
 kaj forlasi vidon mallumigantan la koron  
 se la okuloj ŝatantaj ĉiam persvadas min?

*Noemuti, Okcidenta Timoro, marte 2011*

## Scio ne estu malliberigata

Scio estas kiel akvo fluanta el granda  
 fonto;  
 scio estas branĉo de trunko kreskanta ĉiam  
 bone.  
 Ĝi fluas al tio, kio malplenigas la menson  
 kaj faras laĝeton por ĝin kapti kaj konservi.

Kiel arbobranĉo, ĝi burĝonas kaj floras,  
 poste bonodoras plenigante ĝardenon.  
 Sed kiam avareco plenigas koron avidan,  
 scia laĝeto ne estingas la soifon de la  
 mondo  
 kaj flor-aromo moviĝas nur ĉirkaŭ la  
 ĝardeno,  
 ne troviĝos ĝojo en la mondo, kiu esperas.  
 Se ĉiutage scion ni metas en malliberejon,  
 ni velkigos la intereson bone kreskantan.

*Noemuti, Indonezio, aprile 2011*

## Jadranka Miric (Serbio)



## Ardas Julio

Ekis somero.  
 Varmaj sunaj tagoj  
 plaĉas al homaj reagoj  
 je subitaj ŝanĝoj de vetero.

Florĝardenoj plenplenas  
 de koloritaj floretoj  
 kiuj nin tre allogas  
 kaj magie al ĉiu odoras.

Surstrate belaj inoj promenas  
 vestitaj en multkoloraj roboj.  
 Ruĝaj kaj bluaj maŝoj okulfrapas  
 sur la plaĉaj sablaj ĉapeloj.

En la verda tilibranĉaro  
 vigle kveras turtoj  
 dum en la ombro sub branĉoj  
 sur la benko ĝuas enamiĝinta paro.

## Julia ardo

La flormalfermado matena  
 similas al naskiĝo de matena lumo.  
 Floras la aŭroro en vivokoloroj  
 samkiel aspektas herbejo printempa.

Ardas julia tag'.  
 Homoj freŝiĝas banante sin .  
 Riveroj allogas nin. Same lag'.  
 En urba naĝejo mi vidas vin.

Via malseka harar'  
 brilas sur suna radiar'.  
 Brilas viaj ruĝaj lipoj  
 pretaj por miaj kisoj !!

## Ne forgesu min

Surstrate neatendite  
 mi renkontis vin. Kiaj feliĉuloj!..  
 Verdire, post longa tempo niaj okuloj  
 renkontiĝis. Pluvis kviete!

Blua larĝa ombrelo  
 kvazaŭ kara senfina ĉielo  
 kaŝis nin de pli kaj pli fortaj pluvgutoj .  
 Ilin akompanis larmoj de feliĉo.

Sub ombrelo du homoj  
 trovis preskaŭ perditan feliĉon.  
 Niaj koroj harmonie tiktakadis.  
 En liaj manoj du sukerigitaj pomoj.

Forte memoroj puŝis min  
 pro ŝveliĝintaj sentoj pri vi  
 kiuj fulme kaptis min  
 dum tondre eĥis la via "Ne forgesu min".

### Elena Popova (Bulgario)



## Papilio

Ĉu ĝi konas amon  
 kaj pro forges' doloron ?  
 Tagojn sen varma mano  
 kaj noktojn sen ploroj?  
 Ĉu ĝi havas koron?  
 Demandoj vanaj —  
 Ĝi kaŝas ĉiamon,

neniam forgeson...

## Bonidezino

Kiel juna arbeto  
 kun manbranĉeto  
 sur la Ter' vin apogu —  
 por fort' kaj amo.  
 Ofte dumvoje  
 per vulpaj ruzoj  
 oni vin allogos —  
 sed ne mensogu!  
 Menson de pigoj  
 ne atendu! Strigo  
 saĝa estu kaj  
 gardu vian indon!  
 La viv' estas fabelo.  
 Vi — ĝia floro bela.  
 Feliĉan feston al la infanoj!

### Ivanichka Magharova (Bulgario)



## Fasko da hajkaj

Malvarma lito.  
 La lucerno lumetas.  
 Ne estas patrino.

Ĉambro. Piano.  
 La klavoj jam ŝtormegas.  
 Matena kafo.

Ĉambro malplena.  
 La silento bruegas.  
 Horloĝo ĉesis.

Amara ĝojo  
 kisas mian vizaĝon.  
 Dolora anim'.

Plum' de kolombo  
 alflugis. Ĉu estas am'  
 aŭ disiĝa hor'.

Frost' paralizis  
sensojn. Frostiĝas koro –  
sen am' restanta.

Trans la fenestro  
pala lun' kaŝrigardas.  
Animo ĝemas.

Soleca paŝas  
ŝi sur malseka sablo –  
kun vent' dancanta.

Bela heroldo  
Kisis mian vizaĝon.  
Anim' ĝojegas.

Malĝojo venis  
ĉe mi. Donu la manon  
ni estu ambaŭ.

Li solas. Tasoĵ.  
Mallum' fenestron kisas.  
Malsama pluvo.

Glaso da kafo,  
nigra pec'ĉokolada.  
Soleca nokto.

## Tiberio Madonna (Italio)



## Stranga manĝo

(Rakonteto)

Ni eniris en la strangan restoracion sen tegmento kaj kun brikoj multkoloraj. La stranga kelnero estis lacerto, kiu tamen estis ruĝa anstataŭ verda, kaj surportis oranĝkolorajn vestojn.

Ni eksidis ĉirkaŭ tablon duone rondan kaj duone kvadratan, kiu havis tukon ne sure sed sube, tenatan per gluo. La kelnero diris al ni, ne kio estas por manĝi, sed kio ne estas disponebla, kaj demandis nin, kion ni volas

nemanĝi, tamen komprenigante al ni, ke ĝustetion ni fine devos manĝi. Ni elektis supon de brikoj kaj sukron de ĝirafo, kaj li kapjesis kaj ridetis al ni.

Post unu minuto li revenis portante al ni verdan dolĉaĵon kaj nomante ĝin viando de fiŝo. Ni objektis, ke tio ne estas la mendaĵo, sed li respondis, ke ĝustetion li imagis, ke ni mendis, ĉar ne gravas la diraĵoj sed la pensaĵoj. Li tuj foriris saltetante kaj malbone kantante.

Ni komencis manĝi la strangan dolĉaĵon, kiu tamen estis amara, kaj konstatis, ke ĝi ne vere havas konsiston, ĉar, post kiam ni manĝis grandan kvanton, ni ankoraŭ malsatis.

Ni levis nin kaj foriris, ricevinte monon de la kelnero, kiu salutis nin per frapeto sur la kapo.

Elirinte, ni rimarkis, ke la restoracio havas nun nur unu koloron.

## Elena Popova (Bulgario)

## Amu min, mia Dio!

Ĝi parolis al mi:

– Mi diros al vi kiam mi estas soifa kaj kiam malsata, kiam fortoplana kaj kiam lacigita, kiam vi devas semi kaj rikolti... Se vi rilatas al mi kun amo, mi vin rekomencus per sennombraj donacoj – rezultoj de mia amo. Ĉar vi estas mia ido!...

Estis mia Patrino – la Tero.

Ĝi min parolis:

– Kiam vi perdos viajn lastajn fortojn, kiam viaj okuloj ĉesos vidi la Lumon kaj via koro senti la Amon, vi kuŝiĝu en mi trankvile. Mi varmigos vin per mia ĉirkaŭpreno kaj mi transformigos vin en floron aŭ en verdan herbeton. Vi estos eterna, ĉar mi vivos en vi kaj vi – en mi.

Vi pensas, ke mi estas nur ordinara materio, ĉu? Ho vi, fiera homo! Jes, vere, mi estas kiel ordinara, ankaŭ tiel neordinara, sed sen mi vi neniam povus vidi la belecon en tiu ĉi mondo. Sen mi vi ne povus vivi...

Mia senprudenta ido, amu min! Iu tage nur la belecon kaj amon, kiun mi entute donacas al vi, vi povos kunporti de tiu ĉi mondo. Ĝi estos por vi pasporto dum la flugado inter la steloj...

Tiel parolis al mi mia Patrino – La Tero.

Samtempe mia spirito flugis al la steloj, dezirante sin liberigi de ĝia forto. Mi konfesas, ke krucumita inter la amo al Ĝi kaj al la Libero, inter la Korpo – ido de la Tero kaj la Spirito – ido de la Lumo, mi ofte ĝin ne komprenas. Sed dum la jaroj io varma kaj bela – amo, espero, boneco, beleco kaj pardono al ĉiuj, plenigas min.

Mi Ĝin rigardas kaj aŭskultas ĉiam pli atente. Ĝin, ne sufiĉe amata, mia Patrino – la Tero...

Mi nun bondeziras ĝin:

– Estu eterna, nia bela Tero!



## La verda montarbaro

Mi estas blanka nuboj de kamparo,  
Flosante sur la verda montarbaro.  
Mi lasas kison en la fruktoĝardeno,  
Kaj ĵetas rideton sur lago de beno.

Mi estas printempa brizo de kamparo,  
Blovante tra la verda montarbaro.  
Mi akompanas kompleze vojaĝantojn,  
Kaj sendas al niaj gastoj kantojn.

Pli abunda estos la abunda kamparo,  
Kaj la bela aspekto fariĝu pli juna!  
Pli verda estos la verda montarbaro,  
Kaj nia ekskurso fariĝu pli oportuna!

Rido kaj kanto  
Sonu en la kamparo  
De nia lando!

## Blua ĉielo kaj blankaj nuboj

Blankaj nuboj ŝvebas sur blua ĉielo,  
Kiel magnolioj florantaj kun belo.  
Disiĝis nebulo per vento favora,  
Kaj revenas la printempo glora.

Ho blankaj nuboj plene de klara,  
Vojaĝu kun ni tutmonde sur maro!  
Buntaj nuboj leviĝas sur blua ĉielo,  
Kiel azaleoj florantaj kun belo.

Forigita estas la etoso soleca,  
Kaj radias fajrero de ardo juneca.  
Ho buntaj nuboj plene de klara,  
Vojaĝu kun ni tutmonde sur maro!



## Tenante vian manon

Kiam mi unue enamiĝis al vi,  
Nebulis kaj timidis la emoci'.  
Neniel sufiĉe ni amon eldiris,  
Tenante vian manon mi sopiris.

Multaj jaroj pasis senkonscie,  
Junula koro ne plu flosas ĉie.  
Kiam sonas denove olda melodio,  
Rememorata estas la frua pasio.

Ĉu vin kortuŝas ĉi tiu sento?  
Sed blovas ĉiujare la vento!  
Vian manon mi ankoraŭ tenas,  
Nian fidelan amon mi benas.

Elĉinigi



Yi Qiao (ĉino en

Germanio)

# El Ĉina Antikva Poezio

## Yuan Quhua (?-?)

### —laŭ melodio *Proksimiĝas glavo*

Lastnokte pluvego  
 sukcese estis ĉesigita de l' vento  
 de la orienta direkto.  
 La spektaklfloroj per tento  
 prosperas en nuno.  
 Feliĉe eskapis ili de turmento  
 de l' pluv' kaj ĝisnunas.  
 En halo kaj korto silento  
 ja regas sen homoj.  
 Hirundoj, orjoloj\* jen sur la tegmento  
 pepadis senĉese,  
 verŝajne ĝuante kun mi en lamento  
 la tristan ĉagrenon domaĝi printempon  
 foriri en frua momento.

La bona arbego ankoraŭ vualas  
 jen eĉ en tagmezo per ĝia pintkrono  
 la domon, en kiu kurtenoj ankoraŭ  
 falpendas nun kontraŭ la luma rigoro,  
 ĉar mi ĵus leviĝis kaj ĝuste rigardas  
 flugflirti la flokojn salikajn en soro.  
 Mi kaŝe faligas larmperlojn,  
 volante konfidi al ondoj en nebulkoloro  
 mesaĝon de mi en la menso:  
 “Mi ja malgrasiĝas por li pro sopiro,  
 leteroj liaj nur alsendis de foro  
 salutojn sen diri al mi la  
 hejmenrendaton.”  
 Mi fikse rigardas la montojn  
 en svago vespera, kun spleno en koro.

\*orjolo=oriolo

## Lu You (1125-1210)

### —laŭ melodio *Feniksforma harpinglo*

Rozeta delikata mano  
 alportas tason da flaveca vin'.  
 En la palaca korto

printempa belo plenas en fascin'.  
 La vent' el oriento furiozas,  
 ĝojiga tempo raras kun deprim'.  
 Plenbruste kovas mi ĉagrenon  
 dum repudi' kelkjara sen intim'.  
 Kia eraro! sen anim'! sen anim'!

Printempo restas sama,  
 sed ŝi jam magras tre.  
 Larmfluo ŝia malsekigis  
 mantukon re kaj re.  
 Persikaj floroj falas sur la teron,  
 troviĝas nur solecaj pavilono kaj ale'.  
 Kvankam mi tenas fidelecon al ŝi,  
 tre malfacile mi mesaĝon sendas.  
 Kia ĉagreno! ve! ve! ve!



### —laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Mi loĝas en kamparo pitoreska  
 for de l' vulgara homomonda bru'.  
 Post drink' de bona vino  
 mi paŝas en bambuoj jen kun ĝu'.  
 Post finlegado de taŭista sutro  
 kuŝiĝas mi kaj rigardas la ĉiela blu'.

Mi ĉasas vivon senokupan kaj liberan,  
 malgraŭ ke mi oldiĝos kun tempas',  
 sed mi nur zorgas pri ĝojiga vivo.  
 Mi vere scias, ke l' Ĉiel' pri mia ĉas'  
 jen fajfas, kaj oldiĝon mian  
 ĝi konsideras de l' sortbata la frakas'.

### —laŭ melodio *Kora sento*

Tiujare mi veturis dekmil liojn  
 sola al limregiono per ĉevalo  
 nure por rangpromocio.  
 Kiel songo en memora palo

viv' ĉelima tute vaporiĝis,  
tamen polv' vualo  
kovras la malnovan palton  
el la felo de valora animalo.

Malamiko ne ankoraŭ ekstermiĝis  
sed tempihararo mia grizas kiel  
prujno.

Tristaj larmoj fluas pro nenio,  
ja neniel mi atendas, ke mi en nuno  
sopiremas pri la fronto en la foro,  
sed mi kadukiĝas jam ĉe akva duno.

*Elĉinigis*



**Vejo (Ĉinio)**

\*\*\*\*\*

**Chen Tuan (906 – 989)**

## REVENO AL ERMITEJO

Dek jarojn mi vane klopodis en tiu ĉi mondo,  
Foj-foje en sonĝo alpaŝis al mi ermit-monto.  
Honora rangeco kontentas malpli ol dormado;  
Riĉaj zorgas pli ol malriĉaj en la vivparado.  
Deprimas aŭd' pri suvereno en militdanĝero;  
Afliktas vid' pri ebriuloj de orgiprefero.  
Kun libroj malnovaj al ĉi ermitejo mi iros, —  
Printempan aeron, ĉu floroj, ĉu birdoj, elspiros.

**Wu Jun (469-520)**

## Hato sur monta supro

De monta horizonto nun alŝvebas brumo,  
sin montras tra bambuoj subiranta suno.  
Super tegmento birdoj giras, blankaj nuboj  
eliĝas el fenestroj en ĉiela lumo.

**Xue Daoheng (540 - 609)**

## Nostalgio en ekprintempo

Du jarojn pli frue mi l' hejmon forlasis.

Post la ekprintempo sep tagoj jam pasis.  
Sovaĝaj anseroj norden min antaŭis,  
sed, antaŭ l' florad', min hejmveo ĉirkaŭis.

**Zheng Wenbao (953 - 1013)**

## Disiĝo de amiko

Ornamita ŝip' sin ankras ĉe printempa lago,  
ĝis amiko duon-ebriiĝas de grenbrando.  
Ĝi transportas, spite l' elementojn en la svago,  
plenan malĝojecon de disiĝo al sudlando.

*Elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**



**Zhuangzi**

**ĈAPITRO DUDEK-OKA**

## La reĝoj, kiuj abdikas la tronon

§

28-14

Antaŭ ol ataki la tiranon Jie, la reĝo Tang, la  
fondinto de la dinastio Shang, iris konsulti la ermiton  
Bian Sui, kiu diris:

“Tio ne estas mia afero.”

“Kiun alian do mi konsultu?” demandis la reĝo  
Tang.

“Mi ne scias,” respondis Bian Sui.

La reĝo Tang sin turnis al alia ermito nomata  
Maoguang. Ankaŭ tiu respondis:

“Tio ne estas mia afero.”

“Kiun do mi konsultus?” demandis la reĝo Tang.

“Mi ne scias,” respondis Maoguang.

“Kion vi pensas pri Yiyin?”

“Li estas homo kun forta volo kaj estas kapabla  
elteni humiligon. Mi aŭdis nenion alian pri li.”

La reĝo Tang do konsultis Yiyin pri sendo de puna  
ekspedicio kontraŭ la tirano Jie. Kiam la tirano Jie estis  
renversita, la reĝo Tang volis cedi sian tronon al Bian



Sui. Rifuzante akcepti ĝin, Bian Sui diris:

“La fakto, ke vi venis min konsulti antaŭ ol ataki Jie, estas sufiĉa por pruvi, ke vi konsideris min kiel brutalon. Nun, kiam vi venkis Jie kaj intencas cedi la tronon al mi, vi certe prenas min por homo avida. Malfeliĉe mi vivas en epoko de malordo kaj, ankoraŭ pli netolereble por mi, iu homo senvirta dufoje venis min malhonoru per sia senhonta konduto. Mi ne plu povas elporti la aŭskulton de viaj vortoj.”

Tion dirinte Bian Sui dronigis sin en la rivero Zhoushui.

Poste la reĝo provis persvadi Maoguang fariĝi la reganto, dirante:

“Jen estas la regulo observata ekde la antikveco: homoj saĝaj donas konsilojn aŭ planojn, homoj bravaj ilin plenumas, kaj homoj de humaneco regas super la lando. Estas ja tute nature por vi surtroniĝi.”

Maoguang rifuzis dirante:

“Detroniĝi la suverenon estas ago kontraŭ la justeco; mortigi siajn regatojn estas ago kontraŭ la humaneco; ĝui alies sukceson, kiun ili atingis spite la danĝeron, estas ago kontraŭ la honesteco. Mi iam aŭdis, ke oni devas nek akcepti altan pozicion kaj riĉaĵojn proponitajn de homo sen justeco, nek paŝi sur la landon de regno, kiu estas regata kontraŭ la Taŭo, por ne paroli pri la akcepto de la trono!”

Kaj tion dirinte, kun peza ŝtono sur sia dorso, li sin jetis en la riveron Lushui.

### §28-15

Kiam la dinastio Zhou komencis fondiĝi, troviĝis du nobluloj nomataj Bo Yi kaj Shuqi, kiuj vivis en la regno Guzhu. Ili diskutis inter si:

“Oni diras, ke en la okcidento vivis iu, kiu ŝajnas atingi la Taŭon. Ni do iru lin vidi.”

Kiam ili alvenis al la sudo de la monto Qi, la reĝo Wu de Zhou, aŭdinte pri tio, sendis sian fraton Dan, por ilin akcepti. Dan diris al ili:

“Ni proponas al vi la unuarangan oficon kun duobla salajro. Ni do ĵuru aliancon inter ni.”

Tion dirinte, li skribis la ĵuron. Poste li sigelis la skribitan ĵuron per bova sango kaj enterigis ĝin en la loko, kie la ĵuro okazis.

La du homoj interŝanĝis rigardon kaj ekridetis. Ili diris:

“Ho, kiel strange! Tio estas tute kontraŭ la Taŭo, pri kiu ni parolas. Iam, kiam Shennong regis super la lando, li laŭsezone kultis diojn kaj faris oferadojn. Kvankam li estis tre pia, li neniam petis favorojn. Kun lojaleco kaj sincereco, li regis sian popolon, farante sian plejblon kaj postulante nenian redonon. Li lasis siajn regatojn agi laŭ sia bontrovo. Ili ĝuis la liberecon sin okupi je la regado aŭ je la administrado, se ili estis fervoraj por tio. Oni ne penis rikolti sukceson sur la ruino de alies malsukceso, nek faris sin supera al homoj de malaltaj kaj modestaj pozicioj, nek profitis de la okazo ĉasi sian propran profiton.

“Kaj nuntempe, kontraŭe, vidante la reĝlandon en malordo, la Zhou-anoj perdis nenian tempon por renversi la dinastion Shang. Ili respektas la intrigemajn homojn, kiuj okupas superan postenon; subaĉetas oficistojn, kiuj okupas malsuperajn postenojn; kaj sin turnas al la armilojn por fari minacon al aliaj. Nun ili prezentas la ĵuron de alianco por montri sian sincerecon kaj mortigas la beston por sigeli sian ĵuron; ili fanfaronas pri siaj virtaj agoj por gajni la popolan subtenon, kaj buĉas la popolon por akiri riĉaĵojn. Ĉio ĉi tio povas nur krei pluan ĥaoson anstataŭ tiranecon. Ni aŭdis, ke la antikvaj induloj ne evitis sian respondecon en la paca kaj prospera tempo, nek trenis malnoblan ekzistadon nur por konservi sian vivon en la ĥaosa tempo. Nun ke la mondo estas tiel malluma kaj malbona, kaj la virto de la Zhou-anoj estas tiel dekadencanta, ni do preferu konservi nian karakteron nobla kaj nian konduton senmakula, ol nin malpurigi restante ĉi tie kun Zhou-anoj.”

Tion dirinte, la du homoj komencis sin direkti norden kaj atingis la monton Shouyang, kie ili mortis de malsato.

Homoj kiel Bo Yi kaj Shuqi, eĉ se la riĉaĵoj kaj honoroj estas proponataj al ili, ne ilin prenas je la kosto de la principo. La nobla spirito, la perfekte virta konduto, la ĝuo de la plezuro trovita en siaj agoj, la sinapartigo disde la malpuraĵoj de la mondo — jen la kvalitoj, kiuj konsistigas ilian altan moralecon.

### *Elĉinigis*



**Wang Chongfang**  
(Ĉinio)

# Ĉineske

## Yi Qiao (Ĉino en Germanio)

### *Apud lago*

— laŭ ĉinesko *lotusfolia taso*\*

Apud verda lago,  
tago  
pli belas.  
Kun la kara amikin',  
sen fin'  
kor-helas.

Kun la arda flamo,  
amo  
prosperas.  
En printempa la zefir',  
sopir'  
teneras.

\**Lotusfolia taso* (ĉine: *heyebai*): ĉina fiksfoma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj, laŭ rimaranĝo aab,ccb

## Lago de Baĵkalo

— laŭ ĉinesko *kavalira danco*\*

1.  
Tie ebriiĝis  
brizo primavera.  
Verde vastis herbejo  
kun pejzaĝo prospera  
k. vagad' libera.

Lunlumo aspergis  
amon tra la lago.  
Lumigis la kamp-fajro  
nin ambaŭ kun imago,  
ĝis frua tago.

2.  
Multaj jaroj pasis,  
provis ni por beni.

Kun la ŝanĝitaj paŝoj  
ni ne povas man-teni,  
sed nur ĉagreni.

Palas nun paŝ-spuroj  
al la celo fida.  
Sur lago de Baĵkalo  
kirligās neĝo frida  
k. glaci' rigida.  
3.

Pasio ne povas  
fandi tutan neĝon,  
ĉar ĉi vivo tro kurtas  
por venki natur-leĝon.  
Mi emas preĝon.

Iam la paseo  
reaperos pove.  
Vi aspektos mistera  
ĉe Baĵkalo denove,  
arde kaj move.



\**Kavalira danco* (ĉine: *Pozhenzi*): ĉina fiksfoma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

## Matena suno

— laŭ ĉinesko *kanto de lavantino*\*

Matene  
la ĉiel'  
lazuras je vasta hel'.  
Kolomboj ŝvebas pace  
fronte al sunluma bel'.

Mi kantas  
ĥore kun  
kolomboj fervore nun.  
Tutkore kaj pieme

ni sopiras al la sun'.

Tagoj de  
somero  
plenplenas de libero.  
Mondo estos pli bona  
kun paŝoj de espero.

*\*Kanto de lavantion (ĉine: daolianzi): ĉina fikforma  
poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,  
a, xa (x=senrima)*

## Vespersuno ruĝa

— laŭ ĉinesko *budhista dancisto\**

La ruĝa vespersuno  
ĉiele de aŭtuno  
belas jen sen fin'  
dolĉas kiel vin'.

Pasio brilas  
ni kunjubilas.  
Tarde arda am'  
pompas kiel flam'.

*\*Budhista dancisto (ĉine: Pusaman): ĉina fikforma  
poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5  
silaboj kun para rimo*

## Jadranka Miric (Serbio)

## Ŝanĝoj en la Mondo —1

aŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Alvenis  
la varma somer'.  
Altas temperaturoj!  
Jen, ĝoja saltas paser',  
pli plaĉas vesper'.

Surstrate  
laŭtas gaj-sonoj.  
La viva muzikbando!  
Ŝajnas ke pri virusoj  
forĝesis homoj!

Sopiro  
al maro fortas.  
memoroj pri hejmloko  
min tre maltrankviligas.  
Larmoj aperas.

Neniel  
mi povus ĝui  
dum aliaj suferas,  
nek mi volus militi.  
Mi preĝos al Di'.

Tiom da  
majusteco. Ve .  
Dume per “agent-milit’”  
iuj provokus, ĉu ne,  
Mondmiliton, re!

## Kuraĝe antaŭen!

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Ĉielo  
tute bluiĝis.  
Post ŝtorma nokto suno  
aperis. Jam tagiĝis.  
herbej' verdiĝis!

Ekfloris  
gladioloj. Ho,  
kiaj belaj floretoj  
en kvin koloroj! Tio  
estas magio!

Somere  
riveroj klaras.  
Survoje je senfino  
luno plaĉe vagadas.  
Dum noktoj freŝas!

Somere  
ni ferias. Ve!  
Jes, ĉiu infanoj, pro  
fi-militaj agoj tre  
suferas. Ho, ne !

Vintras je  
Suda duono  
de nia teroglobo.  
Aŭdiĝas milda sono  
“kredu je bono!”

## Naturo kaj ni

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Sennuba  
ĉiel' lazuras.  
Arda aero ĉiam  
arbaron forbrulegas.  
Tio malbonas.

Mateno  
freŝas. Bazon  
oni frue vizitas,  
por eviti varmegon  
kaj tagsufokon.

Akvumi  
ĝardenojn nepras.  
Tamen por ŝpari akvon  
oni tion kondamnas.  
Neniu ignoras.

Ni devas  
planedon nian  
savi. Ne ĉiuj pensas  
tiel, sed havas ian  
kialon sian.

Naturon  
mortigas ofte  
potenculoj milite,  
konscie kaj avide  
senpardonpete.

\*Sopir-al-sudo (ĉine: yijiangnan): ĉina fikforma  
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo  
xa,xa,a (x=senrima).

## Fratoj Grimm

### VULPO KAJ ANSEROJ

La vulpo venis iam sur herbejon, kie sidis grego da belaj grasaj anseroj, jen ĝi ridis kaj diris: „Mi venas ja kiel vokita. Vi sidas bele kune, tiel mi povos manĝi ĉiun el vi laŭvice.“ La anseroj gakadis pro timo, eksaltis kaj komencis lamenti kaj petegi kordisŝire pri sia vivo. Sed la vulpo volis nenion aŭdi pri tio kaj diris: „Ne estas indulgo, vi devos morti.“

Fine iu el la anseroj kuraĝe diris: „Se ni, la kompatindaj anseroj tiel junaj devos lasi nian freŝan vivon, tiukaze cedu al ni nur unu favoraĵon kaj permesu al ni preĝi, por ke ni ne mortu en niaj pekoj. Poste ni starigos nin en vico, por ke vi povos elserĉi ĉiufoje la plej grasan.“

„Jes“, diris la vulpo, „tio estas en ordo kaj krome pia peto: Preĝu, mi atendos tiom longe.“

Sekve la unua komencis sufiĉe longan predikon, ĉiam tiel: „Gak, gak!“ Kaj ĉar ĝi tute ne volis fini la gakadon, la dua ne atendis, ĝis kiam venos ĝia vico, sed same komencis gakadi.

La tria kaj kvara sekvis ilin, kaj baldaŭ ili gakadis ĉiuj kune. (Kaj tiukaze, kiam ili estos finpreĝintaj, la fabelo estu rakontata plu, sed momente ili ankoraŭ gakadas ĉiuj seninterrompe.)

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj,

tradukis



**Dorothea kaj Hans-Georg  
Kaiser (Germanio),**

lingve kontrolis **Vladimir Türk**



Eldonas Redakcio de *Penseo*  
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)  
Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

[www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm)

